# SUDFRANCA STELO

Bulteno de la Esperanto-Federacio « Languedoc-Roussillon »

5, Quai Vauban - 66000 PERPIGNAN (Pyrénées-Orientales) - ☎ 34.38.84

JARA ABONO : 3 F. C. C. P. 956-28 Montpellier

4-an Kvaronjaro 1972 N° 45

## Laborplanoj el lasta konsilio de la ESTRARO

✳

Kiel kutime jam de kelkaj jaroj, la estraro de nia regiona federacio Langvedoko-Rusijono kunvenis en la junuldomo de Narbono lasttempe, dimanĉon 29-an de novembro. Plezure oni revidis unuafoje post lia longa malsano, iomete maldikiĝinta,tamen en bona vojo por atingi kompletan resaniĝon, nian Prezidanton René LLECH-WALTER, pioniro pri esperantismo en Francio.
Doktorino VIERNE, je la komenco de la laboroj malkovris problemojn koncerne al statuto por plibonigi funkciadon en la estonteco de nia regiona federacio.

Tiamaniere post kelkaj minutoj da debato la rezultoj estis formulitaj per jenaj konkludoj :
antaŭ nia venonta kongreso ĉiuj grupoj nepre devas elekti taŭgajn kandidatojn por la estraro de la regionaj komitatanoj, sed demokrate estas preferinde, ke multe pli da kandidatoj ol la dekunu postenoj anoncu sin, oni ŝatas, ke la interesuloj espereble mult-nombraj skribos kiel eble plej baldaŭ al la sidejo.

Aktuale laŭ la statuto nia estraro enhavas 11 personojn,
(laŭ alfabeta ordo)

| | | |
|---|---|---|
| S-ro | AMOUROUX Jean | (Perpignan) |
| " | ANGEVIN Lucien | (Le Cailar) |
| F-ino | AUTHIER | (Béziers) |
| S-ro | DELIGNE Maurice | (Narbonne) |
| " | FRUS Roberto | (Nimes) |
| " | LLECH-WALTER René | (Perpignan) |
| " | PELLETIER Rolf | (Œndras) |
| Groj | RAYNAUD René kaj Anita | (Alès) |
| F-ino | TERRAL | (Béziers) |
| " | VIERNE Yvette | (Montpellier) |
| G-roj | VOLPELIER Roger kaj Renée | (Nimes) |

Tiu Kunsido okaze de nia venonta Regiona Kongreso faros certe plurajn utilajn proponojn sed ĉefe elektos la estraron, kiu espereble bone funkciados dum tri jaroj.

La aktuala estraro pritraktis oficiale la sidejon de la Regiona Federacia Kongreso, ĉar sekve de renkontitaj malfacilaĵoj, troigo da indiferenteco al E. kurso de nia valora kasisto M. Deligne en vilaĝo Bedarieux, estus pli bone ŝanĝi sidejon por la Kongreso. Alès estas nia nova loko verŝajne la 8-a de aprilo 1973. Samtempe la 7-a/8-a de aprilo 1973 kongresos en Ales la francaj esperantistaj fervojistoj, kompreneble la laborkunsidoj okazos aparte sed eventuale la ekskurso kaj la tagmanĝo estos komunaj.

Bedaŭrinde laŭ niaj lastaj informoj, la nova lernojaro estas iomete katastrofo en preskaŭ ĉiuj niaj urboj, nur por la statistiko jen la krudaj ciferoj :

0 - lernantoj en Ales
2 - " " Montpellier (privata kurso ĉe S.ro Lentaigne)
4 - " " Nimes
8 - " " Perpignan + 4 en duagrada kurso
15 - " " Béziers (jes, bonŝance ili estas reale dek-kvin, ni pacience atendos konfirmon en junio.)
sen informoj de Narbonne.

La diskutado falis pli poste en alia aktiveco por atingi aliloke la ŝatatan celon, laŭ nacia nivelo kiel imitinda ekzemplo ni devas daŭrigi grandskale la propagandon de Esperanta eksperimenta evento, oni devas postuli al ĉiuj librovendejoj la libreton eldonitan de Marabout-Flash. Nur tiel ni montros interesojn ĉe aŭtoritatuloj kaj personoj el ĉiu speco pri bona fundamento kie estas bazita nia E. movado.

Al nia komitata kunveno partoprenis ankaŭ hispana apotekisto, tre vigla kaj entreprenema viro kiu prizorgis fondi en sia urbeto San-Pablo apud Barcelono, Esperantan muzeon, eĉ, ĝi troviĝas en strato nomita L. Zamenhof.

Roberto FRUS.

-:-:-:-:-:-:-:-:-:-

Kiel vi konstatas la unua paĝo de S.F.S. estas transformita de ĉi tiu numero. La jaroj pasas malrapide, ni ĉiuj ŝatas aspekti ĉiam junaj, kial do nia ĵurnaleto ne devas evolui kaj sekvi modernan vivon ?
Pro tio oni studis novan ŝildon plej taŭgan al celoj de nia idealo, oni diras ĉiam ke Esperanto estas kiel fenestro malfermita sur la mondo, ni koncize volus montri tion ankaŭ per S.F.S. ĉar eĉ malgraŭ nia malgrandeco kontraŭ plej reprezentaj esperantaj gazetoj, mi opinias ke ankaŭ ni valoras kiel ĉenero de la mirinda interkompreniĝo, kiu estas nia movado.

la direktoro.

-:-:-:-:-:-:-:-:-:-

# La for-ofero inter la jaroj

Karaj gesamideanoj,

Estas ĉiam kun plezuro, ke mi troviĝas inter esperantistoj, ne nur por la plezuro paroli esperanton, sed ankaŭ por pliŝtreĉi la ligilojn inter ni kaj ankaŭ por revigligi nian fidon; kelkfoje povas okazi ke oni senkuraĝiĝas, ĉar la klopodoj faritaj estas sen rezultoj, sed tio estas la sorto de la apostoloj kiuj batalas por la bona kaŭzo.

Sed bedaŭrinde tiu batalo estas por afero, kiu alportas al la novbakitaj nur idealon kaj ne monon. La afero por la apostoloj estas do pli malfacila kaj oni devas havi trezoron de pacienco.

Mi memorigas al vi, ke mi estas esperantisto de 1921-jara do estas 51 jaroj... kaj neniam mi perdis la fidon eĉ dum mia militkaptiteco mi gvidis en la barakoj kursojn de Esperanto. Sed mi devas konfesi, ke dum la libera vivo mi ofte estis sola ĉe la publika kurso; pluvis aŭ frostis, sed mi atendis la belan veteron kaj... la lernantoj revenis.

Mi ne estas sola, en tiu salono estas malnovaj esperantistoj, al kiuj okazis sama afero. Mi memoras pri esperantistigo de Pierre Babin en Agde, Volpelière en Nimes, Robert Lloancy kaj Jean Amouroux en Perpignan kaj certe aliaj... Kaj L.Z.mem diris: "Ni semas kaj semas neniam laciĝas, pri l'tempoj estontaj pensante.

Cent semoj perdiĝas, mil semoj perdiĝas, ni semas kaj semas konstante. Nur rekte kuraĝe kaj ne flankiĝante, ni iru la vojon celitan ; eĉ guto malgranda, konstante frapante, traboras la monton granitan. L'espero, l'obstino kaj la pacienco, jen estas la signoj per kies potenco, ni paŝo post paŝo, post longa laboro, atingos la celon en gloro.

Ni memoru tiujn belajn strofojn de nia Majstro por daŭrigi nian laboron.

René LLECH-WALTER.

Prelegeto de la Prezidanto okaze de la komitata kunveno la 29-an de novembro 1972 al Narbono.

EKSPOSICIO OKAZE DE LA INTERNACIA LIBRO-JARO

KAJ DE LA APERO DE "JE PARLE ESPERANTO"

(J. Thierry) - Eldono Flash.-Marabout.

Dum la tuta novembra monato okazis ĉe "Maison de la Presse" en Perpignan grava ekspozicio.

Apud la libroj "Je parle esperanto" estis bildoj pri la unua universala kongreso en Boulogne-sur-Mer kaj la U.K. de Bologna, silka foto de D-ro Zamenhof kaj multaj verkoj, inter ili; la Floroj de l'malbono, Marta, La Biblo, Topaze, La Naŭzo, La Dolĉa Franclando, Sen Eliro, la Ĉina, angla, kataluna antologioj, Herooj ekzistencialistaj kaj la impona libro "La Dia komedio".

Gazetaro kaj radio favore raportis.

René LLECH-WALTER.

# La angulo de la kasisto




Baldaŭ alvenos la tempo pagi siajn kotizojn.

Malagrabla sed necesa tempo, mono estas la nervo de la milito, diras la proverbo, por ni esperantistoj, ni povus diri "nervo de la paco" ĉar nia movado estas esence paca.

Karaj geamikoj, bonvolu pagi viajn kotizojn, nepre al via LOKA KASISTO, ne al mi. La lokaj kasistoj bonvolos grupigi la kotizojn kaj sendi ilin al mi, je la fino de ĉiu monato. Estus dezirinde, por faciligi nian laboron, ke ĉiuj kotizoj estu pagitaj ekzemple, je la fino de la monato marto, sed tio estas nur persona peto kiu devigas neniun.

Kaj, ĉar la kasisto ĉiam petas malagrablajn aferojn, kontraŭparte, bonvolu akcepti, okaze de la Nova Jaro, liajn plej Bonajn Bondezirojn.

La novaj tarifoj estas la jenaj :

SudFranca Stelo. . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . 3,00 F.

KOTIZOJ POR U. F. E.

Membre adhérent. . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . 8,00 F.
Membre titulaire. . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . 38,00 F.
Membre donateur. . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . 57,00 F.
Membre bienfaiteur. . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . 95,00 F.
Membre titulaire à vie. . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . 760,00 F.
Membre donateur à vie. . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . 1140,00 F.
Membre bienfaiteur à vie. . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . 1900,00 F.


KOTIZOJ POR U. E. A.

Membres de moins de 22 ans avec Jarlibro. . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . 12,50 F.
avec Jarlibro + Esperanto + Kontakto. . 37,50 F.
Membres de 22 à 25 ans inclus avec Jarlibro. . . . . . . . . . . . . . . . . . . . 25,00 F.
avec Jarlibro + Esperanto + Kontakto. . 50,00 F.
Membres de plus de 25 ans avec Jarlibro. . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . 25,00 F.
avec Jarlibro + Esperanto. . . . . . . . . . . . 50,00 F.
cotisation de soutien. . . . . . . . . . . . . . . . 75,00 F.
patrona kotizo. . . . . . . . . . . . . . . . . . . . 500,00 F.
dumviva kotizo. . . . . . . . . . . . . . . . . . . 1000,00 F.
dumviva patrona kotizo. . . . . . . . . . . . 10000,00 F.
Abonnement seul à Esperanto-Revue. . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . 37,50 F.

Maurice DELIGNE.

# KRUCVORTOJ

## HORIZONTALE



R. RAYNAUD

1 – Spektaklejo (R) – Popolkanto propra al usonaj nigruloj. (R)
2 – Kvietiĝi sian soifon – Kapostaro(R)
3 – Denove – Ĉizeli (R)
4 – Prepozicio – Transturni la paĝojn de libro por rapida trarigardo (R) – Konjunkcio
5 – Pedikla tumoro (R) – Rilato inter reala kaj surmapa distancoj (R)
6 – Kalkulita (R)
7 – Multvalora metalo – Speco de mevo Prefikso montranta grandan primitivecon
8 – Kunligi per fadeno (R) – Vira vesto Inverse: nedifinita pronomo.
9 – Unuo de elektra rezistanco – Piulo celanta animan perfektiĝon per korpaj rigorajoj (R)
10 – Vizitkarto (R) – Posesiva adjektivo
11 – Nedifinita pronomo – Tri samaj konsonantoj – Ŝtata ĉefurbo (R) Aŭstrio
12 – Fajna gemo (R) – Tuto de la ceremonioj kiuj karakterizas iun religion (R)

## VERTIKALE

1 – Mikroboj
2 – Rulgvidilo – Rilata al iu Eŭropa popoldemokratio
3 – En iu loko – Impresis la flarsenton
4 – Interne – Ĉesi fari (R)
5 – Fortikaĵo de la Helenaj urboj (R) – Spirebla gaso (R)
6 – En tia maniero – Zamenhof estas la nia....
7 – Persona pronomo – Korpa membro (R)
8 – Demandapronomo – Donanta la impreson de roka malglataĵo (R)
9 – Malrapidiĝi la movon – Inverse: vinberujo
10 – Fandita varmega materio (R) – Mallongiĝo evitanta pluan laŭvican elnomadon Unujara herbo kreskanta en sekaj lokoj (R)
11 – Sola – Taĉmento (R) – Inverse: en iu loko
12 – Distinga signo por garantii aŭtentikecon (R) Arbo, kies foliojn, manĝas iu speco de silkraŭpo (R)


* * *

(R) – nur radiko
Solvinte tiun krucvorton, trovu oblikve zig-zage, la titolon de elstara esperanta-verko – La solvo aperos sur la venonta bulteno.

# 5 minutoj da intervalo





*Kiel virino mi estas danka al vi por la belaj vortoj kiujn vi skribis, sed kiel komitatanino pri la defendo de la Naturo mi estas devigata vin denunci.*



*Kiam mi aŭdos ankoraŭ ke niaj praavoj vivis nur per ĉasado, mi multe ridegos.*



*LA SINMORTIGINTO*



*Estas la nura metodo por manĝigi lin.*



*Vojoj en la montaroj.*



*SEN VORTOJ*

## KION SIGNIFAS ESPERANTO ?

De la respondoj dependas nia agado, pri tio mi ekklarigas per tiu respondo : Esperanto estas lingvo, internacia certe, sed tute ordinara lingvo almenaŭ ĝi devus esti. Ĝi ne estas speciala lingvo de iu asocio. Provizore esperantaj grupoj kaj asocio faras laboron, kiun devus fari U.N.E.S.K.O. ĉe internaciaj medioj kaj ministerioj pri kulturo, eĉ pri komercaj rilatoj, interne de la C.E.E. kiam estos akceptota la ideo ke esperanto estu la dua lingvo de ĉiuj.

Do, kiam oni volas aĉeti libron pri ĝenerala intereso oni iras al librovendejo, konsiderante E. kiel ilon por ĉiuj, kial plej ofte ne estas troveblaj niaj libroj ?

Ne nur faka asocio devas vendi ilin.


Sed kiu ajn normalaj librovendejoj. Nun mi rediras tion, kion jam diris alia samideano : "La lokaj grupoj devas kontakti la librovendejojn de siaj urboj" - Verŝajne unu sola sufiĉas, per akordiĝo ĝi fariĝos oficiala publika vendejo pri E. libroj krome oni gluos afiŝetojn pri Esperanto Loka Informoficejo.

Facile grupano, kiu regule vizitadas la kunvenojn, povas zorgi pri tiu afero al librovendejo, nur tiam la ne esperantistaj personoj vidos niajn librojn reale sen pripensi al ideologioj internaciaj kiel utopio. Oni devas memori, ke ĉiuj ajn rajtas paroli la internacian lingvon sen esti esperantisto militanta el iu asocio, konsiderante ke E. estas kiel normala simpla lingvo uzata de ĉiuj, nur tiamaniere ĝi povos sukcesi.

Kompreneble tiu studado estas diskutota, mi eventuale respondos, se iu argumentos kontraŭ min aŭ aprobe. Ĉiuj rajtas sendi leterojn al S.F.S.

Lucien ANGEVIN.

---



La samideano Lucien Angevin ne estis kaptita en malliberejo... li estas eĉ tro libera viro... Post kelkaj monatoj pasintaj kiel homevitulo, ekkreskis al li nova entuziasmo kaj optimismo, tiamaniere ni oficiale akceptas lin inter ni, kun plezuro.


---

### FEDERACIO "GARD"

La ĝenerala jarkunveno okazos en Nimes (salonego de la urba biblioteko) 19 Grand'rue. Dimanĉon, la 21-an de januaro 1973 je la 9-a kaj 1/2.
Oni esperas kaj kalkulas pri ĉies ĉeesto.

---

*Okaze de Kristnasko kaj Jarŝanĝo*
*ni esprimas niajn sincerajn bondezirojn*
*al ĉiuj niaj legantoj kaj simpatiantoj.*





Ronéotypé pour la Fédération d'ESPERANTO Languedoc-Roussillon
**Directeur de la publication : Roberto FRUS - Ecole Maternelle E. Vaillant II - Z.U.P. — 30000 NIMES**
Dépôt légal : Quatrième trimestre 1972

## LASTMOMENTE

Iom malfrue ni sciis pri la morto okazinta dum la ferian tempon, de S. no COMBES, patrino kaj bopatrino de niaj geamikoj Lentaigne, ŝi estis ankaŭ avino de nia amikino Tarrou. Ŝi malaperis post longa vivo 96-jara pasinta konstante aŭ laboro kaj sindonemo. Ĉiuj kiuj vizitis ŝian domon scias kiel afable ŝi akceptis ilin per ĉarmaj ridetoj.

Ni komprenas la doloron de niaj amikoj kaj kortuŝite ni transdonas nian ĉagrenitan simpation.

A. HORTOLAN

DISTINCTION : Monsieur Camille GUYARD, Président de l'Ile de France Pharmaceutique, 4 rue de l'Alma, Asnieres, Délégué des organisations non gouvernementales à l'U.N.E.S.C.O., fervent partisan de l'Esperanto, membre du Conseil de l'Association d'Encouragement au Bien - Association fondée en 1862 et présidée actuellement par Monsieur Alain Poher, Président du Sénat - a proposé Monsieur René LLECH-WALTER, Président d'Honneur de l'Union Française pour l'Esperanto, pour la médaille de Vermeil de l'Association pour l'Encouragement au Bien.

Cette décoration a été remise par Monsieur Guyard à Monsieur René LLECH-WALTER le 26 novembre 1972 au Palais Consulaire de Perpignan.

C'est au titre du dévouement à la cause de l'Esperanto pendant 51 ans que cette récompense a été attribuée.

Jean AMOUROUX.